

# AMERIKA ESPERANTISTO



JUNE, 1913

# The New Testament

## IN ESPERANTO

Translated from the original Greek by a special committee whose care and competence assure a thoroughly accurate and correct rendering.

### White Paper Edition:

- No. 1. Art Cloth Gilt, 45 cents.
- No. 2. Limp French Morocco, 60 cents.
- No. 3. Leather-lined Persian Yapp, \$1.50.

### India Paper Edition:


- No. 4. Limp French Morocco, 90 cents.
- No. 5. Leather-lined Persian Yapp, \$1.75.



EVERY ESPERANTIST WANTS A COPY.

EVERY MINISTER SHOULD BE SUPPLIED WITH A COPY.

EVERY PUBLIC LIBRARY NEEDS AT LEAST ONE COPY.



The present edition is limited, and there may be much delay before another appears. Therefore send your order at once.

**THE AMERICAN ESPERANTIST CO.**  
WEST NEWTON, MASS.

## **THE AMERICAN ESPERANTO BOOK**

Standard Edition, cloth bound, postpaid for \$1.00

With *new* subscription to **Amerika Esperantisto**, \$1.50

AMERICAN ESPERANTIST CO., West Newton, Mass.

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

*Published Monthly by*

**THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)**

**West Newton, Mass.**

ONE DOLLAR A YEAR

Eksterlande \$1.25 (Sm. 2.50)

SINGLE COPY TEN CENTS

Mallongaj verkoj, tradukaĵoj kaj novaĵoj estas ĉiam prefere akceptitaj. *Oni ne resendadas* neakceptitajn manuskriptojn, se la sendinto ne kune sendis la resendpagon. La Redakcio konservas por si la rajton korekti manuskriptojn laŭbezone. Oni donos la preferon al manuskriptoj skribitaj skribmaŝine.

---

---

Vol. 13

JUNE, 1913

No. 5

---

---

### EL LA REDAKCIA SANKTEJO

Al ĉiu amiko de Amerika Esperantisto kiu legas ĉi tiujn paĝojn, la nova redakcio faras saluton. Ni esperas ke vi ĉiuj daŭriĝos kiel niaj kunlaborantoj kaj per viaj influoj kaj laboroj ni gajnos nekalkulajn novajn aliĝantojn al nia movado. Kiam ni plaĉas vin, ni, la novuloj, ŝatos ke vi laŭdu nin, kaj,—kvankam ni ne ŝatos tiun tiom multe,—ni petas ankaŭ ke vi kritiku nin—*se tia kritiko estas tute meritita kaj plibonigos vian ĵurnalon*. Sen nia dirado, vi scias ke la malmultaj laborantoj ĉe ĉi tiu oficejo nek *havas* nek *havos* la tempon por legi aŭ atenti al malgrandaj kritikoj kiuj ne estas gravaj, kaj al sugestioj kiuj estas nefareblaj. Tial, kvankam ni bonakceptos kritikajojn, memoru ĉi tiujn faktojn antaŭ ol vi sendos ilin.

Ni bedaŭras ke ni devas adiaŭi Sinjoron Reed kiel aktiva ĉefo de nia Esperanta laboro. Unue, kiel nur aktiva laboranto por nia afero, kaj poste kiel sekretario de nia nacia asocio, Sro. Reed ĉiam antaŭenpuŝas nian movadon. Nun li eksiĝis por trovi aliajn laborkampojn kaj je la nomo de la tuta Esperantistaro ni donas niajn dankojn pro liaj pasintaj laboroj, kaj niajn plej bonajn dezirojn por lia estonta sukceso. Al la nova sekretario, ni nur diros, ke oni ne povus trovi samideanon kiu pli taŭgus por daŭrigi la laboron. Ni

ĝojas bonveni lin kiel sekretarion de nia asocio, kaj tuj komencos doni al li la helpon kiun li certe bezonas.

Bonan sukceson al vi, doktoro—la reĝo mortis! Vivu la reĝo!

Ge-Esperantistoj en Oregon kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, bonvole rimarku en la Kroniko pri via venonta Ŝtata Kunveno. Ni esperas ke vi ĉiuj donos al la samideanoj kiuj nun laboras por la sukceso de ĉi tiu bonega afero, la subtenon kiun ili nepre meritas.

Ni estas certaj ke ni skribas je la nomo de ĉiu amiko de nia movado, kiam ni gratulas la samideanojn en Pittsburgh pri la sukceso kiun ili ĵus atingis. Ni esperas,—ne, ni estas certaj—ke la afero en tiu urbo de nun prenos novan vivon, kaj al ĉiuj Esperantistoj kaj Esperantistinoj tie ni sendas niajn bonvolojn por daŭrigota sukceso.



Prof. Edmond Privat

En malmultaj vortoj ni deziras sciigi al vi pri la promeso kiun ni citis en la Maja numero, rilate al Prof. Edmond Privat. Ni faris aranĝojn kun ĉi tiu eminentulo per kiu li skribos *sole* por via gazeto, Amerika Esperantisto, originalan Esperantan novelon sufiĉe longan por ke ni devos presi ĝin kiel daŭrigota rakonto de monato al monato. La unuaj ĉapitroj komencos en la aŭtuno, kaj ni nuntempe, nur volas diri, se via abono finiĝos intertempe vi necese tuj renovigu ĝin por ke al vi ne manku eĉ unu ekzemplero.

Ni faris aranĝojn doni al niaj legantoj bonegan raporton pri la IX-a Kongreso en Bern, kiu estos belege ilustrita. Tiu presiĝos en la oktobra numero, en kiu ankaŭ ni presos multe da propagandaĵoj. Ĝi estos tre bona propagandilo, kaj ni povos sendi ĉi tiun specialan numeron al vi po dek ekzempleroj por unu spesmilo. Por ke ni sciiĝu kiom da ekzempleroj ni devos presi, ni petas vin mendu kiel eble plej frue. Tuj kiam ili estos presitaj ni sendos ilin.

*Mendu Hodiaŭ!*

## KICKS AND KOMMENTS

The editor sat in his sanctum, his countenance furrowed with care,  
His mind at the bottom of business, his feet at the top of a chair.

—Will Carleton

And this is what he read:

“The new front cover looks like a hen-coop struck by lightning — there’s not much of it.”

“When it gets a little fatter and you give us an illustration or two it will be O. K.”

“I was much pleased with the copy of the magazine just received.”

“I congratulate you on the appearance of the new Amerika Esperantisto. It is very pretty, easy to read and carefully gotten up.”

“I like the new style of the magazine very much.”

“I received the May number of A. E. and I like it in its new form; I hope that in its future appearance it will be considerably fatter. This, after all, will depend on the support of the Esperanto fraternity.”

“I received the Esperantisto in its new garb, and like the smaller size of the pages much better.”

“Enclosed please find \$1.00 and continue my Amerika Esperantisto another year. I certainly will not miss the dollar so much as I would the magazine.”

“It certainly has a fine typographical appearance.”

“The smaller size of the paper is an improvement with its single column, and I congratulate you on the change.”

“I am just sending my renewal and thought I’d take this occasion to tell you how I like A. E. in its new dress. Ekstere, I confess, its new dress is — well, severely simple . . . but inside I do like it very much. I think the single column page a great improvement over the double for stories. I like your type — it is clear and easy to read . . . I like your initial letters . . . AND I like your ads. They are good looking . . . and that they do the work — witness my accompanying order.”

---

Viro, post ŝippereo, trovis sin sur insulo kie, li supozis, kanibaloj loĝas. Dum tri tagoj li kaŝis sin, kaj tiam malsato elpelis lin. Li vidis fumon malantaŭ arbetaro. Li kviete kaj zorge alproksimiĝis, kaj baldaŭ aŭdis voĉon dirantan, “Kial en infero vi ludis tiun karton?” Li falis sur la genuojn, suprenĵetis la manojn, kaj ekkriis, “Dank’ al Dio. Ili estas Kristanoj.”—*Life*.

“Paĉjo, al kio similis la antaŭhistoriaj monstroj?”

“Mi ne memoras. Demandu al via patrino.”

**FOREIGN NEWS**

AFRICA. Esperanto will be taught in the trade school in Oran, through the influence of S-ro Asquinazio.

In Melilla an Esperanto club has been founded by a captain of the Spanish army.

The President of the local Esperanto Society in Natal (So. Africa) delivered a most interesting lecture on Esperanto at the Y. M. C. A. The speaker told of the need for an international language, and the fallacy of presuming that any national tongue would be accepted as an international means of communication. A free class is being conducted by the society and much newspaper space allowed them by the local dailies.

AUSTRIA. In Bielitz a course is attended by more than 100 students.

Good reports of Esperanto activity come from Graz and also from a number of towns whose names are not so familiar in Usono.

Abdul Baha visited Budapest during the last month and addressed the Esperantists of this city in the old Palace of Parliament. The affair was in charge of the "Idealist Society," and the large audience was composed mostly of Esperantists, suffrage and peace advocates. The well-known president of the local society, Dr. Glesswein, is on his way to the United States to take part in the Peace Congress to be held in New York. He will represent Hungary. Upon returning to Budapest he will preside at the International Suffrage Congress which will take place in that city. In regard to this congress the Budapest Esperanto Society is working with the organizing committee and is preparing, with the help of the visiting Esperantists, to show the representatives of the many nations present, that Esperanto is a living language of a living people.

A course of Esperanto is being taken by some 20 persons in the Royal University at Budapest.

In a recent magazine appear the portraits of two seven-year old boys who speak Esperanto as fluently as their native tongue, being the sons of Esperantist officers and very well taught.

In the Austrian army are used these many languages, showing the need for Esperanto: German, Hungarian, Bohemian, Ruthenian, Dalmatian, Polish, Croatian, Servian, Roumanian, Bulgarian.

BRAZIL. At the banquet, concert and Esperanto exhibit with which the Rio de Janeiro Esperantists celebrated Dr. Zamenhof's birthday (as related in the Jan. Feb. issue of Brazila Esperantisto, recently

received), the most honored guest was Dr. Fortunato Sudre, the best Latinist of Brazil, who in a short speech expressed his appreciation of Esperanto, "the glorious posthumous child of the Latin language."

BULGARIA. Mr. Hristo Harelamd, editor of "Lumo," and founder of the Turnov Esperanto Group, has been killed in the Balkan war.

CHILI. At the 8th Chilean Scientific Congress a resolution was approved, requesting the introduction of Esperanto into schools and commercial institutes, also into the military and naval academies.

CHINA. A socialist paper — the first one published in China — has appeared in Chinese and Esperanto.

The Hina Respublika Esperanto-Asocio has progressed rapidly in the one year of its existence. It now numbers more than 300 members in its classes and is doing excellent propaganda work.

ENGLAND. A significant proof of the increasing prestige of the international language is the fact that the Oxford Committee for the Spread of International Peace and Friendship, consisting of some of the most eminent university professors, have just made use of our language. Desiring to express their good wishes and to increase friendly relations among university students throughout the world, they have issued a circular printed in English, Latin and Esperanto.

FINLAND. The 3rd congress of Finland Esperantists was held in Helsingfors the 8th and 9th of March, and was a great success, the Esperantists of many different Finland cities constituting a large and gay throng.

FRANCE. The annual convention of the French Esperantists took place in Toulouse and was highly enjoyable as well as efficient from the business and administration point of view. City officials held a brief reception and made speeches to the Esperantists, also sent flowers for each person at the banquet held later in the week. At Lyon the Workman's Esperanto Group held a "grande fete," with propaganda lecture, etc.

GERMANY. The German Esperantists are apparently perfecting an excellent system of organization, as the general Association contains subsidiary groups such as the Bavarian Esperanto League, Northwest Germany Esperanto League, Saxon Esperanto League, etc., all of which are reporting steady and gratifying progress, good meetings, etc.

At the invitation of the "Stuttgart Esperanto-Stelo," Abdul Baha visited Stuttgart the 5th of April and addressed a large audience.

Government assessor, Dr. Schramm, principal of the Royal Saxon Esperanto Institute in Dresden, has been appointed director of the Royal Saxon Esperanto Library. With the approbation of the ministry, this Institute has established Esperanto schools in the cities of Dresden, Leipzig, Zwicken, Zittau, Chemnitz, Planen and Auerbach. In the industrial school of the city of Leipzig, an Esperanto examination of the city officials took place in the presence of the mayor, with very good results. The city council of Leipzig had already, some time ago, allowed 400 marks for instruction in Esperanto in that city.

HOLLAND. In this small country there are 55 groups with 2031 active members. This does not pretend to include all the Esperantists, but merely the workers and propagandists.

ITALY. The 4th congress of Italian Esperantists will take place in Milan from August 31st to September 2nd, immediately after the close of the 9th in Bern. The proximity of Milan to Switzerland will enable many visitors to the International Congress to take part in the National Italian Congress.

In Rimini a new Esperanto group of over 50 members has been founded with the mayor as honorary president. In Genoa there is much activity, lectures before audiences of from 300 to 800 persons being reported and classes also.

JAPAN. An Esperanto Society consisting of over 500 members, is reported in Tokio. Baron Hayashi, a well-known diplomat, is president of the Japanese Esperanto Association.

"Orienta Azio," a beautiful little monthly magazine with colored illustrations, is printed in Esperanto, Japanese, Chinese and Korean. With each month's regular number appears an instruction booklet in the Japanese or Chinese language. The yearly subscription is Sm. 1. 20, which may be sent to the address "Sekaigo-Soin," Ousakimaci, Ebaragun, Tokio.

MADAGASCAR. There are said to be more than fifty Esperantists in the tribe of Hovas, and 14 among the Betsileos, two of the fourteen tribes composing the population.

PERSIA. The small Esperanto key is being translated into Persian by a young Bahai who knows several languages. Another Persian is translating the "Fundamento" into his native tongue.

PORTUGAL. Esperanto is taught in two commercial schools in Porto.



RUSSIA. Five Esperanto courses were in operation at the beginning of the year, and a new society has been recently started, the 12th such organization in St. Petersburg.

In Zaporajje-Kamenskoje a ball and entertainment were arranged in March by the local Esperantists. A play had been prepared for presentation—one of the favorite Esperanto plays. When the play was reached on the program, however, a police officer entered and ordered that the play be given in Russian, although permission had been given the players to present it in Esperanto. A couple of recitations in Esperanto were permitted, however, and the evening finished with a supper and dance.

SPAIN. In Seville the number of Esperantists (including also among the local police) is steadily growing, and an Esperanto booth was among the attractions of the interesting yearly fair not long ago.

The Hon. Salvador Albert, of the Spanish Parliament, presented the matter of Esperanto to the Congress of Chambers of Commerce in Madrid, which passed a resolution approving its adoption.

The city government of Oloto appropriated 500 pesetas to aid the Catalonian Esperanto Convention. Another Spanish town has named a street in honor of Dr. Zamenhof.

SWEDEN. A new Swedish magazine, "La Espero" has appeared, and two new clubs are reported in Stockholm.

SWITZERLAND. Many Swiss magazines are now publishing lessons in Esperanto. The "Schweizerische Bürgerzeitung" in Zurich is conducting a constant Esperanto section under the supervision of a special editor. The seminario Muristalden in the Congress City, Bern, has a large class studying diligently. Forty-two postmen are studying, intending to be of much help to the Congress visitors. Many large classes are reported from neighboring towns and cities.

## IX. UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Berno 24-31 Aŭgusto 1913

**D**UAN fojon Svislando havas la honoron kaj la feliĉon gastigi la internacian Esperantistaron. Ĉi tiun fojon la svisa Ĉefurbo Bern mem afable akceptos la gastojn.

La organiza laboro de la Naŭa nun tre bone marŝas, kaj la aliĝoj iom post iom alvenas, sed tamen estas necese, ke la Esperantistoj, kiuj intencas partopreni en la kongreso, aliĝu ĉiuj kiel eble plej baldaŭ.

Nia kara Majstro D-ro *L. L. Zamenhof* ĵus sciigas nin, ke li ĉeestos la kongreson kun la *tuta familio*, edzino kaj tri gefiloj. Estas do devo de ĉiuj Esperantistoj honori la Majstron per sia ĉeesto kaj tiamaniere ankaŭ helpi al la bonsukceso de la Naŭa.

La kongresanoj renkontos tutan serion da amuzaĵoj kaj belaj festoj. Laŭ la provizora programo, kiu cetere fariĝos definitiva tuj

post aliĝo de sufiĉe granda nombro de samideanoj, ni havos la jenajn festaranĝojn: La internacia balo en la paradizaj haloj de la Kazino. La samideanoj bonvolu pretigi kaj alporti siajn naciajn kostumojn. Grandan koncerton de Berno virĥoro kun diversaj gesolistoj. Ekskurso en la plej belan parton de la svisa Alparo (tutan tagon) kun pikniko kaj koncerto en Interlaken, veturado sur belega lago de Thun, meze de la montegoj, kaj vespermanĝo en Thun. Teatra prezentado (Originala verko en Esperanto). Festeno sur monto Gurten apud Bern (alteco 860 m) kun "Jodlada" koncerto, svisaj luktludoj k. t. p.

La diversaj alpaj fervojoj donas specialan rabaton por la kongresanoj.

Svislando estas ĉiujare la renkontejo de milionoj da fremduloj el ĉiuj kontinentoj, kaj ni konsilas al la Esperantistaro atentigi eventualajn vizitontojn de Svislando pri la favoroj, kiujn povos havigi al ili la kongreso, por ke ili uzu tiun tempon por sia vizito, eĉ estante neesperantistoj, sed pagante la kongresan kotizon da 6 Spesmiloj.

La subkomitato por la Loĝado eklaboris kaj povas de nun plenumi la petojn pri ĉambroj k. t. p.

Por personoj dezirantaj restadi ĉu antaŭ ĉu post la kongreso kelkajn tagojn aŭ semajnojn en bonaj ripozejoj, la komitato preparas liston de tre rekomendindaj pensionoj en la ĉirkaŭaĵo de Bern kaj en aliaj partoj de la lando. Aliĝoj al tiaj pensionoj ni de nun kolektos kaj donos informojn pri prezoj k. t. p.

Kaj nun, karaj samideanoj el tuta terglobo, venu multnombre al nia bela kongreso, sendu tuj vian aliĝon kun la responda kotizo da 15 Fr. (6 Sm.) al la "Kantonalbank" en Bern, mendu viajn ĉambrojn kaj la diversajn eldonaĵojn de la kongreso, poŝtkartoj, sigelmorkoj, por fari per ili propagandon.

*Kun samideanaj salutoj*

LA DIREKTANTA KOMITATO.

*Sinjorino:* "Knabeto, ĉu vi ne scias ke la fumado mallongigos vian vivon?"

*Knabo:* "Ho, mi estas indiferenta. Mi estas vidinta ĉion."

Oni parolis pri vidvino. "Ĉu ŝi estas vestita nigre pro sia estinta edzo?"

"Ne. Pro sia estonta. Ŝi scias ke nigrakoloro estas beliga."

"Ĉu S-ro. Timo iam parolas aŭtoritate?"

"Jes, kiam li parolas kun sia edzino."

## MI, BRAVULO

**K**IAM Katrina kaj mi transloĝiĝis en la novan domon kiun mi konstruigis en la okcidenta kvartalo de la urbo,—kvartalo tute apud la montetoj kaj arbaroj de la kamparo, kaj tial ankoraŭ maldense loĝata,—pro kelkaj kaŭzoj ni nin gratulis. Unue pro tio, ke ni nun povos ĝui tiun kvietecon kaj senbruecon netrovatajn en la malnovaj kvartaloj; due, pro la pureco kaj freŝeco de la kampara aero; trie, pro la multo da spaco kiu ĉiufanke ĉirkaŭis nin, kaj pro la rezultanta foresto de tro proksimaj najbaroj. Plie ni trovis kaŭzon por la memgratulo pro la manko de tiuj urbaj maltrankviligistoj kiuj eluzas tiom da tempo kaj pacienco de la urbanoj,—la librovendistoj, la almozpetantoj, la preĝejvizitantinoj, ĉiaspecaj agentoj, kaj fine, sed ne plej malgravege, la domrabistoj.

Tiu lasta penso multe plaĉis al mi, pli multe ja ol al Katrina, kiu ĉiam diris ke ne troviĝas en la mondo rabisto kiu povas timigi ŝin aŭ eĉ momente maltrankviligi ŝin. Sed mi mem jam travivis du vizitojn de domrabistoj, kaj tiuj du travivaĵoj ne estis tute agrablaj al mi.

Ne malagrablaj pro tio, ke mankis al mi la kuraĝo, dum tiuj okazaj—ne, ne! Volonte mi komparos mian kuraĝecon kun tiu de iu ajn dommastro. Sed esti vekata el dolĉa dormado; esti devigata leviĝi je noktomeza horo, kaj frostiĝante kaj tremetante pro la malvarmeco, ĉirkaŭfaleti ĉirkaŭ la ĉambroj en la mallumo, vundante la piedfingrojn, frapigante la kruojn sur la meblaron, duonrompante la kapon sur la murangulojn; senpacience atendi la foriron de la nokta vizitanto; poste ripari la fenestron aŭ pordon kion li difektis,—jen kial mi tiom malŝategas domrabistojn.

Al nia nova, izolita domo, mi diris, ĉi tiaj sinjoraĉoj neniam alvenos. Tro malproksime de la urbcentroj kie ili kaŝe loĝas kaj laboras, ili tute ignoras nin, mi kontente kredis. Krome, ĉu ili ne bone scias ke nur malriĉuloj loĝas apud la urblimoj?

Sed Katrina ne same opiniis kiel mi. Frue, malfrue, ŝi diris, ili venos. Kaj pli danĝerhava estos tia vizito ĉi tie ol kie ni antaŭe loĝis. Tie oni povis elŝovi la kapon el la fenestro kaj ekkrii “Helpu! Helpu! Rabistoj!” kaj tiel veki policanon aŭ alvenigi najbarojn, sed ĉi tie, tute izolite, ni devos turni nin al ni mem por helpo.

Tiel ŝi argumentis. Kaj plie ŝi postulis ke mi aĉetu du revolverojn—unu por ŝi, unu por mi.

Sensenca ideo, mi plendis, tamen mi aĉetis la du pafilojn, pagante dek dolarojn po ĉiu.

Mi mem neniam pafis revolveron. Mi ne ŝatas iajn pafilojn. Ne pro tio ke mi timas ilin—ne, ne! Sed ili nervemigas min, kaj—mi ne ŝatas ilin. Male, Katrina trovas grandan amuzon en ili. Ŝi komencis sin ekzerci je la pafado en la arbaro malantaŭ nia domo, uzante la novajn pafi-

lojn kiujn mi aĉetis, kaj post trimonata ekzercado ŝi povis trabori barelon malproksiman dek paŝojn, je ĉiu pafo. Sen ŝia uzado, la revolveroj estus tute malutiliĝintaj, ĉar mi mem neniam rigardis ilin.

Monatoj pasis, la unua jaro, la dua, kaj pri rabistoj mi ĉesis pensi. Kun la librovendistoj, la almozpetantoj, la preĝejvizitantinoj, ili restis for, same kiel mi profetis. Ĉio ĉe ni estis trankvila.

Kaj tiam unu nokton, meze de la vintro, ili venis! Malvarmege? Brr-rr-r-r! Mi ankoraŭ frostotremas, memorante tiutempan veteron. Vere mi kredas ke iu vizitanta nordpolusano estus hejmenkurinta tiun nokton por eviti la malvarmegecon kiu envolvis nin.

“Hektor! Hektor!” subparoletis Katrina, samtempe skuigante min. “Vekiĝu! Vekiĝu!”

“Mmm-mm-m-m!” mi dormeme murmuris.

“Leviĝu tuj!” ŝi ekkriis. “Ili ĉeestas! Ili laboras en la subteretaĝo!”

“Kiu?” mi ekdemandis, supren saltante. “Kiu laboras?”

“Ili, la rabistoj! Mi aŭdas ilin!”

“Ho! Nur rabistoj? Ili laboru! Bone!” Kaj mi rekuŝiĝis kaj supren tiris la litkovrilojn. Ne tial ke mi sentis ian timon—certe ne. Sed kiam Katrina parolis mi dorme komprenis ke plumbistoj estas laborantaj en la domo, kaj la memoro pri la kosto de antaŭnelonga plumbista laboro estis sufiĉe freŝa kaj viva por fari min tre maltrankviligebla.

“El la lito, sentaŭgulo!” akre ordonis Katrina. “Ĉu vi pensas ke mi senkuraĝe permesos rabistojn forŝteli niajn havaĵojn? Ne! El la lito kaj sekvu min!”

Dum ŝi parolis ŝi forlasis la liton, kaj mi aŭdis ŝin faletantan ĉirkaŭ la ĉambron. Kaj mi—kion cetere fari—mi ankaŭ ellitiĝis. En mian manon ŝi enmetis unu el la dekdolaraj revolveroj, dirante mallaŭtvoĉe, “Ni malsupren iru, ni, kaj senbrue!”

Kion fari? Mi devis ŝin sekvi, kvankam kore mi ne volis tion fari. Ne pro tio ke mi estis senkuraĝa—ne, tute ne! Sed estis tiel malvarmege, kaj ĉirkaŭvagi noktevestite estis certe treege malagrabla.

“Aŭskultu ilin, la aĉulojn!” subparoletis Katrina kiam ni alvenis al la suba ĉambro. “Ni ekkaptos ilin! Jen! Min obeu! Vi eliru el la domo kaj kviete alpaŝu ĝis la fenestro tra kiu ili enrampis. Mi malsupren iros en la subteretaĝon. Kiam ili ekelkuros je mia alveno—kiel certe okazos—vi renkontos ilin ĉe la fenestro.”

“Sed Katrina, karegulino—”

“Hektor! Obeu min! Rapidu!”

“Sed Kat—”

Ŝi malfermis la pordon kaj elŝovis min. Mi ne deziris eliri. Ne pro tio ke mi timis ion—tute ne. Sed permesi mian amatan edzinon malsupren iri en tiun ĉambron kie laboris rabistoj—la penso estis teruriga,

timiga.

Mi staris sur la verando. Hele brilis la luno. Miliono da steloj tremetis kaj brilegis en la sennuba ĉielo. Neĝkovrita estis la tero, ĉie granda, blankega ebenaĵo similanta iun glaciigitan polusan maron. Akrega, tranĉanta vento blovis, pikante kiel ponardo.

Malvarmege? Aj! Aj! Nepriskribebla estas tiu malvarmegeco! Mi frostotremis, mi spasme spiregis. Tiel agoniiga estis la malvarmegeco ke mi ŝvitis, vere jes!

Halteme mi surpaŝis sur la neĝon. Ĝi estis malmola, glita kiel la glacio. Subite, neatendite, miaj piedoj ekpaŝis sur aeron; vane mi ek-kaptis plenmanojn da atmosfero, kaj eksidiĝis! Miliono da steloj, ne en la sennuba ĉielo, dancis antaŭ miaj okuloj.

Malbenante rabistojn, malvarmecon, neĝon, stelojn, ĉion, mi dolorplene leviĝis. Tute pretigita por returnen iri mi estis, sed mi pripensis Katrinan.

“Kuraĝu, Hektor!” mi diris en mi mem. “Antaŭen! Pro Katrina! Pro Katrina!”

Mi alvenis al la angulo de la domo, kaj ĉirkaŭrigardetis ĝin. Aj! Aj! Tiu vento! Ĝi vundis kiel tranĉilo. Mi povis vidi la subteretaĝan fenestron. Ĝi estis malfermita—granda, nigra truego. Ha! Ĉu ne io en ĝi sin movis?”

Mi ne restis. Mi min turnis kaj rapidegis al la veranda pordo. Ne tial ke mi estis timigita—certege ne! Sed vere neniu homo vestita kiel mi tiam estis, povis toleri tian tranĉantan venton.

Mia mano estis sur la pordo, kiam mi aŭdis la sonon de du pafoj—Bang! Bang!

“Katrina! Katrina!” mi ekkriis, kaj per grandegaj saltoj mi returnen kuris al la angulo kaj ankoraŭ antaŭen.

Viro estis elgrimpanta el la fenestro. Antaŭ ol mi atingis lin li leviĝis de la tero, ekkaptis sitelon kiu staris sur la neĝo apud la fenestro, kaj forrapidis trans la ĝardenon.

Mi sekvis lin, kriante “Haltu! Rabistoj! Haltu!”

Kaj li haltis. Ne memvole sed male. Liaj piedoj eksupreniris kaj li frapegis la teron peze, plenkorpe. Granda grunto eliris el lia buŝo.

Li ne forlasis la tenilon de la sitelo, kaj kiam mi atingis lin mi vidis ke ĝi estas karbsitelo, ke ĝi enhavas karbon, mian belegan, karan antraciton kiu kostis al mi ok dolarojn po tuno!

Per la lunlumo mi rimarkis ke la rabisto estas nigrulo, maljuna nigrulo, malalta kaj dika. Multevestita li estis per longa survesto, peltaj botoj, grandaj gantoj, dum la kolon envolvis granda, nigra tukego. Kovris la kapon felta ĉapo sub kies rando mi vidis lian grizan, lansimi lan hararon. El la grize nigra barbo kiu preskaŭ tute kaŝis la vizaĝon du timplenaj okuloj elrigardis min.

Mi surĵetis mian revolveron sur la neĝon. "Redonu al mi mian karbon!" mi tondrovoĉe ekkriis, kaj sovaĝe mi ekkaptis la tenilon de la sitelo kaj ekeltiris ĝin el liaj manoj. Turniĝante mi rapide kuris al la pordo, ĝin malfermis, ensaltis kaj triumfe turnis la ŝlosilon. Katrina ĵus estis suprenvenanta el la suba ĉambro.

"Mi havas ĝin! Mi havas ĝin!" mi eksciteme ekkriis. "Mi savis ĝin! Mi savis ĝin!"

"Kion vi havas, Hektor? Kion vi savis?" scivoleme demandis Katrina, malrapide transpaŝante la ĉambron.

"La karbon! La antraciton!" mi respondis. "Jen ĝi estas!"

"Kaj la rabisto, kie li estas?" ŝi demandis akrevoĉe.

"Kial diri ion pri li?" mi diris. "Jen la karbo; mi ĝin ekkaptis! Ĉu mi ne estas bravulo!"

Longtempe Katrina min rigardis, senvorte, mokeme, kompateme. Dume mi pli malvarmiĝis, kaj sub ŝia rigardo pli maltrankviliĝis.

"Kie estas tiu dekdolara revolvero?" ŝi fine demandis.

"Mi metis ĝin sur la teron," mi respondis.

"Enportu ĝin; ĝi difektiĝos tie."

Rapide mi elkuris kaj aliris al la loko kie mi estis ekkaptinta la rabiston. Li ne estis tie. Ankaŭ la revolvero ne estis tie.

"Vi havas ĝin?" demandis Katrina kiam mi eniris.

"Mi ne povis trovi ĝin," mi respondis.

Subite ŝi sidiĝis kaj komencis ridi. Laŭte, senĉese ŝi ridis, ridegis, ridegadis. Spasme spirante, duonplorante, histerie ŝi ridis.

Tia konduto tre kolerigis min. Timante ke mi diros ion poste bedaŭrindan, mi supren iris al la dormoĉambro kaj enlitiĝis.

ESTO.

Ambaŭ knaboj estis estintaj malĝentilaj al sia patrino. Ŝi enlitigis ilin pli frue ol ordinare, kaj plendis al ilia patro kiam li hejmen revenis. Li supren ekiris la ŝtuparon, kaj la knaboj aŭdis lin venontan.

"Jen Paĉjo venas," diris Marteno. "Mi ŝajnigos ke mi dormas."

"Ne mi," diris Henriko. "Mi leviĝos kaj min vestos per du pantalonoj."

Tradukis E. D. K.

La patrino de Harold ne povis trovi sian kombilon. Ŝi demandis al la fileto.

"Harold, ĉu vi vidis mian kombilon?"

"Jes, Patrino, ĝi estas en tiu plado da akvo."

"Kion ĝi tie estas faranta?"

"Vere, mi ne scias, escepte se ĝi eniris por lavi siajn dentojn."

Tradukis L. D. BECK.

## LA FANTAZIA PROFETECO DE LEONO TOLSTOJ PRI LA NUNA MILITO

En la "Revujo" de la monato Februaro, 1913, de la Nov-Jorka Gazeto "Sun" ni trovas interesan rakonton pri la profeteco de Leono Tolstoj, koncerne la nunajn okazintaĵojn sur la Balkan-Duoninsulo.

La rakonto estas skribita de la Grafino Nastasia Tolstoj, nevino de Leono Tolstoj.

**J**E LA aŭtuntempo de la jaro 1910, rakontas la grafino Tolstoj, la Rusa carino invitis ŝin en la reĝpalacon, kaj diris al ŝi, ke la caro volas vidi ŝin.

Oni enkondukis ŝin en ĉambron, kie la caro Nikolas sidis kun siaj filinoj kaj ludis ŝakojn. La caro preparolis kun ŝi pri Leono Tolstoj.

"Mi ne ŝatas Tolstojon," diris Nikolas, "la maljunulo skribadas tiaĵojn kiuj ne plaĉas min. Nun, mi volas peti ion de li, sed mi ne scias kiel min turni al li, kaj tial ke vi estas lia parencino, mi volas peti de vi . . . ."

"Certe, via majesto, mi faros tion plaĉe," diris la grafino. "Nu, la reĝo Vilhelmo de Germanujo," daŭrigis la caro, "kaj la reĝo Georgo de Anglujo petis min, ke mi havigu al ili de Tolstoj ian sciigitaĵon, ian leteron, iaĵon, kiu ankoraŭ nenie aperis. Kiam vi obtenos tiaĵon por mi de Tolstoj, skribu poŝtkarton al la Korteg-ministro, kaj mi difinos tempon kiam vi denove vizitos min."

Semajnon post tio, la grafino vizitis Tolstojon, kaj liveris al li la postulon de Nikolas.

"Mi plaĉe faros tion," diris Tolstoj, "sed mi skribadas por la popolo, kaj tial jam dekutimiĝis skribi por reĝoj."

"Leono Nokolaeviĉ!" diris al li la grafino, "skribu ian profetecon pri la politik-stato."

"Tiu-ĉi estas bonega sugestio!" ekkriis Tolstoj: "de la lastaj kelk-jaroj ŝvebas en mia cerbo ia menso, ne, ne menso sed io . . . . se mi kredus je spiritoj, mi dirus, ke antaŭ mi aperas spirito; kaj mi povas je iu momento aperigi antaŭ mi tiun 'spiriton'. Sed la malhelpo estas, ke kiam mi vidas tiun spiriton, tiam miaj manoj fariĝas kvazaŭ paralizitaj, kaj mi ne povas skribi."

"Nu," diris la grafino, "mi skribos, kaj vi diktos."

"Bone," konsentis Tolstoj.

Li sin apogis sur sia seĝo; iomete delasis sian kapon; ŝirmis siajn okulojn per sia mano; kaj profunde pripensiĝis. Ĉirkaŭ dek minutojn li sidis senmovante. Fine li malfermis siajn okulojn, rigardadis antaŭ si, kvazaŭ li metus sian vidadon al la "spirito" kaj ekparolis per glora voĉo de poeto:

"Super la supraĵo de la maro de la homara sorto mi vidas aspekton de nuda virino ŝvebante. Ŝi estas majeste belega diino. Ĉiuj nacioj

postsekvos ŝin. Ĉiu nacio penadas altiri al si ŝian rimarkecon. Kaj ŝi, kiel preciza koketulino flirtas al ĉiu. Kaj sur la ornamaĵoj, kiuj ornamas ŝiajn hararojn, mi vidas ke estas surskribita la vorto 'Komercismo.' Ŝi, la diino de komercismo, flirtadas kun ĉiuj; malavare donacas al ĉiuj koketajn ridetojn; sed malantaŭ la donacoj ŝi lasas al ili ruinaĵojn. Ŝi spiradas per negocadoj, paroladas per voĉo de ormetalo. Kaj la avida vidado de ŝiaj okuloj estas ensorbataj de forta veneno por la nacioj, kiuj fariĝis viktimoj de ŝia gloro.

